★ UNIVERSALA-ESPERANTO-ASOCIO ★

# KOMERCA BULTENO

FONDAĴO C. VANDERVLIET – URBA PUBLIKA BIBLIOTEKO

*Organo de la Komerca fako de U. E. A.* ★ *Senpaga aldono de* Esperanto

**Nº 1** REDAKTORO : W.-A. VOGLER **Aprilo 1911**

**Redaktejo : W.-A. Vogler, A B C-strasse, 52, HAMBURG (German.)**

## AL NIA LEGANTARO !

Ni prezentas al vi hodiaŭ la unuan numeron de la *Komerca Bulteno* de U. E. A. kiu estas oficiala eldonaĵo de la komerca fako de nia asocio. La bulteno aperos kiel senpaga aldono de *Esperanto* kaj estos aparte sendata al ĉiuj komercaj konsuloj kaj al la Esperantiaj Entreprenoj havantaj komercan karakteron Bonvolu konsideri tiun bultenon kiel simplan modestan provon, kiu certe estas plibonigota kaj esperebIe povas esti plibonigata, se vi ĉiuj kunhelpas kaj liveras utilan kaj interesan materialon. Per spertoj ni volas lerni ; do, spertigu nin kaj montru al ni la vojojn, per kiu la enhavo povas esti pliperfektigata. Ĉu niaj intencoj, aperigi la bultenon regule ĉiumonate povos baldaŭ efektiviĝi, tio ja dependas de la apogo de niaj kunlaborantoj, kiujn ni serĉas precipe en la rondoj de la komercaj konsuloj. Dum 1911 verŝajne ĝi ne povos ankoraŭ aperi je fiksa epoko, nur laŭ bezonoj kaj cirkonstancoj.

Vi jam estos divenintaj kiaj kaŭzoj instigis nin al la eldono de tiu ĉi aldono. Unu el niaj plej altaj celoj estas ja gajni la komercistaron por Esperanto kaj utiligi al ĝi kiel eble plej baldaŭ la servojn liverotajn per helpa lingvo kaj speciale per la bona organizo de U. E. A. Grava ilo devas esti la *Komerca Bulteno*, se ĝi enhavos informojn interesajn kaj utilajn el ĉiuj anguloj de la komerca mondo. Antaŭ ĉio ĝi povas utili al niaj komercaj konsuloj (kiel informilo kaj apogilo ĉe la varbado de novaj komercaj membroj), al niaj Esperantiaj Entreprenoj, kiuj povos elĉerpi gravajn faktojn, fine al ĉiuj Esperantianoj iel ajn interesataj pri komercaj kaj trafikaj aferoj.

Ni kutimas konsideri la komerciston kiel pioniron de la kulturo ; same Esperantismo celas plialtigi la kulturon de la homaro. Do estas nepre necese, ke la du samcelantoj kunigu la manojn kaj kunlaboru en ambaŭflanka intereso. Se la helpa lingvo havas la povon ebenigi la vojon de la komerco, kaj se la organizo de U. E. A. pruvas, ke ĝi jam nun liveras praktikajn, utilajn servojn, tiam ankaŭ la komerco devas ekkoni sian devon, reciproke apogi la laboron senegoisman de la Esperantistoj. Se la komerco konscie helpas la disvastigon de internacia lingvo, ĝi faras al si mem la plej gravan servon. La timo de kelkaj miopaj malgrandanimuloj, ke ilia nuna per la ampleksa kono de fremdaj lingvoj, akirita supereco estos subite neniigita, pruviĝos tute vana kaj senbaza. La komerca supereco de iu popolo ne fondiĝas unuavice sur lingvaj povoj, sed sur komerca lerteco kaj sperto kaj sur la kvalito kaj prezindeco de la komercaĵoj.

Do, karaj gelegantoj, kunlabor -antoj kaj -ontoj, komprenu bone la gravan taskon de nia nova entrepreno kaj helpu nin energie plenumi tiun taskon per liverado de bona utila ŝtofo. Donu al ni precipe originalajn informojn pri ĉiuspecaj komercaj aferoj, pri foiroj kaj ekspozicioj estantaj kaj estontaj, pri nemulte konataj industrioj de landoj ne jam kuŝantaj ĉe la ŝoseoj de la granda mondkomerco. Ni nek volas nek povas konkuri kun la grandaj naciaj komercgazetoj, sed per nia speciala tutmonda organizo ni eble povas liveri informojn tute specialajn kaj pro tio des pli valorajn.

Por veki la ĝeneralan intereson ni aranĝas angulon por demandoj pri komercaj kaj industriaj aferoj ; la respondoj estu donataj de la legantoj kaj kunlaborantoj.

Ni ĝojos, se la interesuloj eldiros siajn dezirojn pri la plua organizo de la bulteno, por ke ĝi respondu baldaŭ al la grava celo.

La plej ĝojiganta rekompenco de nia penado estos ne nur bona akcepto de nia *Komerca Bulteno*, sed antaŭ ĉio la fervora kaj fruktodona kunlaborado de ĉiuj niaj komercaj reprezentantoj, por ke la utilo liverota al la Entreprenoj kaj membroj, kaj fine al la tuta komerco, kresku samtempe kiel la bulteno mem.

*La redaktoro* : W. A. VOGLER,
Prezidanto de la komerca komisiono.

*Ĉio koncernanta la redaktadon de tiu Bulteno, kaj nur tio, estu sendata al S-ro W. A. Vogler*, A. B. C. Str., 52, Hamburg, 36 (Germanujo).

## KOMERCA VIVO

### Evolucio de l'komerco en Hamburgo dum la lastaj jardekoj

Ricevis la premion Warden ĉe la konkursoj organizitaj de U. E. A. en 1909.

Hamburgo estas la plej granda kaj plej grava komercurbo de l'kontinento. Jam de l'mezepoka tempo la komerco tie ĉiam floris bonege, kaj en ĉiuj tempoj la hamburga komercistaro distingiĝis per granda entreprenemo, celema obstineco kaj sagaceco.

Nun en preskaŭ ĉiuj ĉefaj komercurboj de l'mondo oni povas renkonti la hamburgan komerciston, se ne kiel memstaran posedanton de komercdomo, tiam almenaŭ kiel komizon (« Juna viro ») de iu germana aŭ fremdlanda firmo. Estas malnova bona kutimo, ke la filoj de la grandaj firmoj, kiuj iam estos mem portantoj de la firmo, pasigas kelkajn jarojn transmare, por atingi la necesajn konojn de la negockutimoj de la lando kun kiu la ĉefaj rilatoj estas subtenataj. Tio estas certe tre bona edukrimedo, ĉar la restado en la fremda lando donas al la juna viro vastan rigardon por komercaj aferoj. Precipe li ĉiam penadas akiri fundamentan scion de la fremdaj lingvoj (1). Tiu scio kunigita kun la zorga komerca edukado kaj kun bona kono de la komercaĵoj lin taŭgigas kiel pioniron de la germana komerco en eksterlando. La konscio de liaj povoj donas al la hamburga komercisto sufiĉe grandan certecon en liaj agoj kaj ceteré elastecon. Tial li malofte estas senkuraĝigata per malfavoraj batoj de l'sorto ; kun forta memkonfido li rekomencas denove, kiam li eble maltrafis en iu entrepreno. En tiu ĉi rilato li tre similas al siaj anglaj kuzoj, kiuj sendube ofte estis liaj instruantoj.

Dum la kurado de la jarcentoj per gravaj krizoj la hamburga komerco estis preskaŭ nuligita, sed nenio povis

(1) Tiu ĉi scio estas sendube unu el la kaŭzoj por la stranga fakto, ke la hamburga komercisto malgraŭ sia universaleco ne ŝatas ĝis nun la helpingvan movadon.

703590-II

* UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO *

# KOMERCA BULTENO

*Organo de la Komerca fako de U. E. A.* ★ *Senpaga aldono de* Esperanto

No 2 REDAKTORO : W.-A. VOGLER Julio 1911

Redaktejo : W.-A. Vogler, A B C-strasse, 52, HAMBURG (German.)

Ĉio koncernanta la redaktadon de tiu Bulteno, kaj nur tio, estu sendata al la Redaktejo

## AL NIA KUNLABORANTARO !

La unua numero de la nove kreita aldono al *Esperanto*, la *Komerca Bulteno*, faris, kiel juna apenaŭ flugpova birdeto, sian unuan provoflugon en la mondon. Se ĝi komence timetis, ĉu la akcepto ĉe la legantaro estos kuraĝiga, nun ĉiuj duboj malaperis, ĉar el multaj landoj sonis simpatiplenaj voĉoj tute aprobantaj la formon, enhavon kaj celon de la verketo. Kompreneble estas ankaŭ nombro da legantoj, kiuj estas ne tute kontentaj je la enhavo kaj certe havas dezirojn pri pli granda universaleco. Se ili ankaŭ silentas, ni tamen sentas, ke ili estas pravaj. Sed, kara legantaro kaj kunlaborantaro, bonvolu pripensi, ke la aranĝo de la artikoloj ne sole dependas de la lerteco de la redaktoro, sed plimulte de la kunlaborantoj. Se ili sendas al ni informojn el ĉiuj landoj, ni povas fari ŝanĝoriĉan elekton, kiu kontentigos la plimulton. Antaŭ ol la nombro de la originalaj artikoloj el la diversaj landoj pli grandiĝos oni ne povas meti en la ŝuldkonton de la redaktoro la mankon de pli diversflanka materialo. Tamen kun granda ĝojo ni povas konstati, ke nombro da amikoj jam sendis artikolojn kaj promesis fervorplene kunlaboron, la vico de la landoj estas ankoraŭ tre malgranda. La komerco kaj industrio de la kondukantaj landoj ja estas sufiĉe konataj de la tuta mondo en siaj ĝeneralaj konturoj kaj ne bezonas reklamon. Bonajn servojn ni povas eble liveri al specialaj industrioj kaj industriistoj nemulte konataj kaj tamen sufiĉe gravaj, se ni atentigas la tutmondan komercistaron pri ilia ekzisto kaj specifa karaktero. Tia procedo facile povas informi interesulojn pri novaj fontoj de bezonajoj kaj kaŭzi novajn komercajn interrilatojn. Ni nur aludas la artikolojn pri Bolivio en No 1 kaj Amiens en la nuna numero.

Cetere tre gravaj por la internacia komerco estas la frutempa kono de traktadoj pri novaj komercaj kaj industriaj konvencioj, inter la ŝtatoj, ĉar tio helpos la interesulojn ĝustatempe zorgi pri favoraj liverkontraktoj.

Do, fervorplenaj delegitoj kaj komerckonsuloj ! Vi ĉiuj estu konsciaj, ke vi estas gravaj ĉeloj en gravega monda organismo, la komerca fako de U. E. A. Tiu apenaŭ naskiĝinta organismo povas evolui al la dezirinda signifo nur, se ĉiu ero dokumentas vivon kaj viglecon kaj atribuas sian malgrandan forton al la tutajo. Nur se ĉiu konas kaj plenumas sian devon, ni povas certe ligi la venkon al nia celado.

Se ĉiu pensanta ano nur kelkafoje dediĉas kelkajn momentojn al tiu celo, eble naskiĝos en lia cerbo iuj ideoj utilaj por ni. Li ne hezitu informi nin pri ili, ĉar ofte unu ŝajne sensignifa ideeto naskas alian pli grandan kaj iĝas tiel la fonto de grava agado.

LA REDAKTORO.

## KOMERCA VIVO

### Evolucio de l'komerco en Hamburgo dum la lastaj jardekoj (II).

#### Kelkaj rimarkoj pri la jaro 1908

La komparo de la ciferoj de 1907 kaj 1908 vidigas klare, ke la dum la lastaj jardekoj preskaŭ senhalte kreskanta komerco de Hamburgo havas iome rekurantan movadon dum la lasta jaro. Tio ne povas mirigi, ĉar en nia komerco kvazaŭ respeguliĝas la komerca situacio de la tuta mondo. La reiranta movado rezultanta el la granda grava krizo de Usono disvastiĝis rapide tra ĉiuj landoj de l'terglobo sekve de la malvastaj komercaj interrilatoj de la landoj.

Pro la interrilatoj de la Hamburga komerco al ĉiuj partoj de la mondo ĉiu ŝanceliĝo en la egalpezo de komerca vivo de kiu ajn lando jetas sian ombron sur la Hamburgan foiron. Tamen en si mem la komerco kaj industrio en la Hamburga regiono estis tute sanaj.

Feliĉe ne montriĝis forta financa krizo, kiel aperis en pli fruaj jaroj kaj havis ofte tre domaĝan efikon.

Ankoraŭ en la komenco de la jaro mono estis tre kara, ĉar dum la antaŭaj jaroj la tre florantaj komerco kaj industrio postulis grandajn kapitalojn. Sed vidante la komencon de la krizo la komercaj kaj industriaj rondoj prudente sin retenis de novaj entreprenoj. Tiu reteno kaŭzis baldaŭ grandan plimalaltigon de la procentmezuro.

Natura konsekvenco estis malprogreso de la komercaj vendoj, retiro de la spekulacio malalta stato de la prezoj de la plej multaj komercajoj. Tiu ĉi malfavora situacio efikis tre altgrade sur la Hamburgan ŝipinterkomunikiĝon. La eksterordinare floranta komerco de la lastaj jaroj postulis tre fortan plimultigon de la ŝiparo, de kiu granda parto nun subite estis kondamnata al senfrukta ripozo.

La ĉiulanda krizo plimalaltigis la aĉetpovon de vastaj popolrondoj, sennombraj manoj restadis senlaboraj, tial ne estas mirige, ke en transmaraj landoj grandaj amasoj da komercajoj restis nevenditaj.

La konsekvenco estis, ke la mendoj de la eksterlandaj komercistoj mankis kaj granda nombro da enlandaj fabrikejoj devis limigi aŭ ĉesigi la laboron.

Aliflanke la rikoltoj en Germanujo estis grandparte bonegaj, kio efikis plimalaltigon de la importo de homaj kaj brutaj nutrajoj.

Grandan parton de la enspezoj de la ŝipkompanioj liveras la pasaĝeroj el- kaj remigrantaj. Sed kiam transmaraj landoj ne promesas grandajn laborgajnojn al la laboristoj de la malnova mondo tiam la allogo al la elmigrado malaperas kaj la laboristoj komencas remigradi al la hejmo. Pro tio la nombro de la elmigrantoj estis tre malgranda kompare kun la nombroj de la antaŭaj jaroj :

1906 : 173.483 per 818 ŝipoj ; 1907 : 189.810 per 805 ŝip. ; 1908 : 79.000 per ĉ-aŭ 400 ŝip. ; 1909 : 113.535 per 552 ŝip.

Por paralizi iom la malfavoran efikon de malbonaj cir-